

• ESPERANTO •

EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 9

FEBRUARO, 1950

Ses Pencoĵ

Redaktoro: W. Auld, 23, Ashdale Drive, Mosspark, Glasgow, S.W.2

Gentila Jurnalisto

En komenco de februaro la glasgova societo okazigis ekspozicion, kiu estis modere vizitata. Ŝajnas, tamen, ke inter la vizitintoj sin trovis inkognite Andrew Bonar: rubrikisto ĉe la populara skota gazeto "Daily Record," ĉar je la 7-a de februaro aperis tuta artikolo nur pri la ekspozicio kaj Esperanto.

Kiel verko de laiko la artikolo estis entute surprize bona kaj justema. "Se Esperanto povos efektive solvi la internacian krizon, nu feliĉon al ĝi," diras s-ro Bonar. Poste li skizas la naskigon kaj celon de la lingvo, la ĉefajn trajtojn de la gramatiko kaj citas (tute korekte) unu esperantan frazon: "La internacia lingvo Esperanto estas simpla, regula, belsona kaj facile lernebla." Li aldonas:

"Ni ne estu cinikaj. Esperanto estis certe nobla ideo kaj miloj da sinceraj homoj ankoraŭ kredas, ke ĝi kapablas helpi al solvo de hodiaŭaj mondproblemoj. Esperantistaj konferencoj havas la spiriton de agit-fervoro kaj kamaradeco, kiu karakterizas ĉiujn grandajn movadojn en ilia infaneco, kaj miloj da personoj el ĉiuj nacioj parolas sole Esperanton dum tutaj tagoj, kio pruvas almenaŭ, ke ĝi sukcese funkcias.

Estis atendeble, ke nia publicisto ie-tie falos en eraron. Kaj efektive lia artikolo tuŝis du punktojn, pri kiuj li ne bone informiĝis, kun jena rezulto:

"La reguleco de la lingvo verŝajne klarigas tion, ke kvankam multaj libroj estas tradukitaj en la lingvon, ne estas kreita ĝis nun iu granda, propra, originala verko. La literaturo ja bezonas iom da libereco, kaj sintezaj lingvoj estas striktaj kiel tambura ledoro." Kaj plue:

"Iom ironia fakto estas tio, ke dum la kvindek jaroj de la ekzistado de Esperanto pluraj aliaj konkurencaj lingvoj estis elpensitaj:

sekve se ĉiuj hodiaŭ ekvolus lerni artefaritan lingvon, ni povus fine atingi novan Turon de science elpensita, absolute regula Babelo."

Mi tuj skribis al s-ro Bonar, laŭdante lian artikolon entute, sed informante kaj korektante lin pri la du gravaj eraroj, kiujn li faris. Mi skribis rutine, sen espero, ke mi ion atingos per tio, ĉar multjara sperto instruis al mi la ĝeneralan vanecon de tiaj klopodoj — kiujn ni tamen kaj malgraŭe ĉiam denove faras:

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,

Ni semas kaj semas konstante.

Je mia surprizo mi ricevis post kelkaj tagoj tre afablan leteron de s-ro Bonar:

"Dankon pro via letero . . . Kompreneble mi ĉiam tre volonte akceptas instruon kaj mia sinteno al Esperanto, volu afable kredi, estas senmikse simpatia.

"Mi ne estas kompetenta juĝi ekzakte inter Esperanto kaj la aliaj internaciaj lingvoj, do mi ne provos, tamen mi konfesas, ke via defendado de Esperanto laŭ ĝia socia rolo kaj evoluo ŝajnas al mi logika kaj kredinda. Nu, se temos pentofari pro miaj eraroj, mi volus unue renkonti vian William Auld, kiu certe povos liveri al mi interesan materialon kaj ebligos al mi ĵeti pluan lumon sur Esperanton por profito de la legantaro de Daily Record."

Nu, ĉiu scias, ke mi estas por samideano Auld tre lojala amiko, tamen venas certaj okazoj, ĉiam . . . Unuvorte, ĉe ricevo de la supra letero mi tuj serene perfidis nian poeton-redaktoron en la manojn de la publicisto. Sed mia konscienco estas trankvila. Auld scias ja tre bone ke, se nia sankta afero tion postulus, eĉ mi mem senhezite oferus . . . ankaŭ aliajn amikojn sur la altaro de nia afero.

Kaj nun ni atendu, kio okazos.

R. Rossetti.

Marjo: **La Akcidento** (Unuakta bagatelo)

En la domo de Doktoro Kuraci.
D-ro K. (eniras, viŝante la manojn) Fine la lasta paciento foriris! Kia longa labortago! Kioma horo estas? (Rigardas la horloĝon) Jam la oka! (Skuas la kapon, demetas la viŝtukon.) Ha, mia libro! Bone! Nun mi ripozos en mola brakseĝo kaj legos. (Prenas la libron kaj sidigas.) "MURDO EN WOOLWORTH'S." (Malfermas ĝin kaj trovas slipon. Li legas ĝin.) Johano! Donu lakton al la kato unue, kaj legu poste." (Ekgemas.) La kara edzino! Nu, kie estas la kato? (Li leviĝas kaj serĉas en la ĉambro.) Pus-pus-pus!

(Fortaj frapoj ĉe la pordo.)

K: Ha, la kato!

Petro. (eniras) Bonan vesperon, Johano! Ĉu vi finis drogi la pacientojn?

K. (ridetas) Ha, bonan vesperon, Petro! Jes, mi ĵus finis. Eniru, eniru.

P. Ho, mi eble malhelpas vin. Mi revenos kiam vi estos pli libera.

K. Restu, restu. Mi estas tute libera nun. Sidigu—vi estas tre bonvena.

P. Dankon. (Rigardas tra la fenestro) Kia bela sunsubiro! La tuta ĉielo flamas.

K. (Rigardas) Jes, ĝi similas grandan fajron. Tre bela, tre bela.—Sed sidigu. Kiel iras la fabriko?

P. Ho, ni ne parolu pri tio! Mi venis por forgesi pri la laboro dum unu horo. Ĉu ne?

K. Certe—ni babilu pri aliaj aferoj. Vi ankoraŭ kolektas la poŝmarkojn?

P. Jes, kaj mi ĵus akiris novan sudamerikan markon de mia frato, Arturo. (Serĉas en la poŝoj) Li estas granda helpo al mi. Mi opinias, ke li korespondas kun la tuta mondo.—Ne, mi ne havas ĝin ĉe mi. Sendube mi—

K. Ne gravas. Mi vidos ĝin alian fojon. Via frato estas tre fervora esperantisto, ĉu ne?

P. (ridas) Ho, Arturo estas frenezulo! Li ankaŭ faras poemojn. Kia infanaĵo, la poemoj, ĉu ne?

K. Jes! Mi preferas legi pri bona murdo. (Prenas la libron.) Jen, ekzemple: "Murdo en Woolworth's." (Vidas la slipon) Ho, tiu kato! Ĉu vi ne vidis mian katon ekstere? Mi devas doni al ĝi lakton, alie la edzino koleros. . .

P. Ne, mi ne vidis ĝin. Ni serĉu.

(Ili serĉas, vokante Pus-pus-pus! **K.** genuas por rigardi sub meblo. Arturo enkuras.)

Arturo. Petro!

P. Arturo! (Arturo transfalas super la klinita **K.**)

K. Pardonu! (Li rektiĝas.) Ĉu vi vundigis?

A. (sur la planko) Petro! Okazis katastrofo!

P. Katastrofo? Ha, ha, tre bone! Jes, ni serĉis la katon, kaj okazis kat-astrofo!

A. Ne ridu! Estas serioza afero. Via (domo)—

K. (interrompas lin) Ne serioza afero. Nur malgranda akcidento. Ĉu vi doloras ie? (Iras al li, palpas lian kapon.) Via kapo sangas. Mi tuj bandaĝos ĝin.

A. Mia kapo ne gravas! Mi venis por diri—

K. (trankviligante lin profesie) Poste, poste. (Li rapide bandaĝas lin. Petro helpas.) Vi ricevis nervoŝokon. Tss! Ne parolu. Jen, ĉu ne pli bone? Sidigu. Ni ĵus parolis pri vi kaj via poezio.

A. Mi ne—

K. Jes, jes, mi komprenas. Vi estas modesta. Nature.

P. Jes, faru al ni poemon, Arturo, ĉu ne? Donu al ni ekzemplon de via talento.

A. Mi ne venis—

K. Jes, vi venis—kaj vi estas bonvena! Nu, malgrandan poemon. Kiel komenci?

P. Jen!—"Vi serĉis vian fraton, Sed mi serĉis la katon—"

K. "Mi serĉis sub la sofo,

Vi falis—katastrofo!

(**P.** kaj **K.** ridas.)

A. Sed estas vera katastrofo! Via do—

K. Trankvile, trankvile! Vi estas tro nerva post via akcidento. Ripozu momenton.

P. Kaj faru al ni poemon. Pri io ajn. Pri—nu vidu, pri la sunsubiro. Kial ne? "La sunsubiro, kiel granda brulo—"

A. Ĝi estas granda brulo, ho stultulo!

P. Bone! "Granda brulo, ho stultulo."—Sed ne nomu min stultulo. Eĉ en la poezio mi ne permesas tion.

K. Trankvile! Vi ne devas eksciti la pacienton. Ni devas uzi la poezion por trankviligi lin. Ekzemple:

"La bela muziko lulas min."

P. Malbone, malbone! Via ritmo estas tro salta. Aŭskultu:

"La dolĉa melodio lulas. . ."

A. Kaj dume via domo brulas!

P. Ne, ne! Tio estas tro kruda! Provu denove. Ni devas reveni al la sunsubiro. (Li elrigardas tra la fenestro.) Kiel longe ĝi daŭras! Stranga afero. . . Jes, jen ni havas:

"La suno sur la firmamento Subiras—"

A. —en la oriento!

K. (mire) Jes! Guste! Tio estas la oriento, ne la okcidento. Tio ne estas sunsubiro—

A. (al Petro) Sed via domo, stulta viro!

P. MIA DOMO?

A. (ekgemas) Jes, mi penis diri al vi la tutan tempon. VIA DOMO BRULAS!

La Impulso Al La Malo

Lastatempe, mi legis artikolon, kiun mi opinias pripensinda.

La verkinto opinias ke, ne malofte, subtenantoj de kredaroj, dogmoj kaj organizaĵoj ĉiuspecaj, senintence fuŝargumentas pro tiu emo: kredi, ke la kuracilo kontraŭ ĉia malbono estas ties malo. Ekz.: kontraŭ varmego, malvarmego; kontraŭ rapido, malrapido; kontraŭ blanko, nigro; k.t.p.

Mi denove pensis pri tiu artikolo, legante alredaktorajn leterojn en gazeto de bicikla organizaĵo. Ekestis interesa korespondado pri la utileco de internacia lingvo, kiam oni libertempas alilande. La samideanoj priskribis (ĝenerale ne troigante) la avantaĝojn, kiujn oni ĝuas dank' al Esperanto. Sed, el kelkaj el tiuj leteroj, ne-Esperantisto facile povus kredi ke dank' al nia lingvo, la lingvaj baroj tuj komplete disfalos kiam oni vojaĝas alilande.

Kaj, laŭ la letero de unu nesimpatianto, mi eksciis, ke Esperanto estas nur la senutila ludilo de kelkdekoj da frenezigitaj idealistaĉoj: ". . . Se vi troviĝus sur fora vojeto en Hungarujo kaj alparolus Esperante preterpasanton, ĉu li vin komprenus? Kompreneble, ke ne! Tial vi ne vane elspezu tempon,

lernante Esperanton. Anstataŭe vi lernu du aŭ tri eŭropajn lingvojn."

Al ni, kiuj jam multfoje aŭdis tiujn fuŝargumentojn, tiaj diroj havas efikon nur ridigan. Sed bedaŭrinde ili ne malofte erarigas eksterulojn. Atentinde estas ankaŭ, ke la letero de la mallaŭdanto ekestis pro antaŭa letero kiu, liaopinie, troigis kaj tro pretendis favore al Esperanto. T.e.: pro la impulso al la malo.

Ĉiutage ni vidas pluajn pruvojn pri tiu mensa sinteno, ne nur rilate al lingvoproblemoj, sed ankaŭ rilate al politiko, religio, k.t.p. En lastatempa numero de "Heroldo de Esperanto" aperis artikolo pri la eksterordinara elasteco kiun lastatempe alprenis la vorto "demokrateco." Mi konstatas la samon, rilate al (inter aliaj) la vorto "faŝisto," kaj konjektas, ke en estontaj vortarlibroj ni trovos la klarigon: "Faŝisto: tiu, kiu malsame opinias. Ekz. vegetarano (se vi mem kutimas manĝi viandon). Aŭ viandmanĝemulo (se vi estas vegetarano)."

Denove: la impulso al la malo!

Kion do mi celas? Nur tion, ke ni pli helpes la antaŭeniron de nia afero, se ni ĉiam faros nian eblon eviti tro fanfaronajn asertojn pri la ĝisnuna disvastigo de nia kara lingvo, kaj neraciajn pretendojn pri ĝi.

Ekspozicio En Angers

Ĉiujare dum junio okazas en Angers, Francujo, grava komerca foiro, kaj la loka Esperanto-grupo bone eluzas la okazon por propagandi nian aferon. Ili faras grandan montrejon, kaj rikoltas atentindajn rezultojn en la nombro de lernantoj, kiuj enskribiĝas dum la ekspozicio. Ĉi tiun jaron ili deziras ŝanĝi sian prezentadon, kaj tial bezonas novan provizon da materialo propaganda. Ili petas, ke la samideanoj sendu al ili: poŝtkartojn, kiuj montras nacian kostumon aŭ tipan nacipejzaĝon; poŝtmarkojn, eĉ tute ordinarajn, uzitajn aŭ neuzitajn; infanajn desegnojn ne tro grandajn kaj precipe kun loka aŭ landa intereso; alian utilan materialon. Ili anticipas dankas kaj nepre kvitancos la senditajn objektojn.

Espereble multaj legantoj volos subteni la fervoran laboron, kiun faras la samideanoj en Angers por nia afero.

Anoncoj

"La Ponto," oficiala monata gazeto de Germana Esperanto-Asocio, publikigos en speciala numero dum somero 1950 korespondanoncojn de ekster-germanaj samideanoj. Alskriboj al Esperanto-Centro, (13b) Münching-Pasing, Engelbertstr. 7, Germanujo.

La redaktoro de "Esperanto en Skotlando" dankas ĉiujn amikojn, kiuj sendis bondezirojn kaj sugestojn por la bulteno. Li aparte dankas s-ro A.A.M. Whitehead en Welling, Kent, pro la bonkora salutkarto "de forloganta skoto."

La n-ro 10 de la bulteno eliros la 1-an de majo, 1950. Grupsekretarioj bonvolu sendi raportojn kaj kontribuantoj materialon ĝis la 21-a de marto.

Ĉar nia konkurso n-ro 1 ricevis neniun subtenon, s-ro Fabian sciigas, ke li provizore ĉesigas tiun rubrikon.

Kvin Poemoj

LA VIVOMARO

Peliĝi plu al ĉiam novaj bordoj . . .

Jen, ni balance buas,

Jen, mergo nin detruas,

Zefiras jen, nin ŝiras jen la nordoj.

Al horizonto malfermiĝas pordoj,

Sed trafi ni malfruas,

Ĉar tuj fortrene fluas

La ondoj kiel impetulaj hordoj.

Nin lulas, batas laŭ alternaj sortoj

La mar'; eĉ dum ni ĝuas

La sala flu' nin ruas,

La vivon rojnas per insidaj mordoj.

Kaj kiam fine mankas al ni fortoj

Kaj lukti ni enuas:

Sensone tuj ni truas

La akvon sinke al la pacokortoj.

Reto Rossetti.

KRISTNASKO

Infankrieto, virinflustro laca

En duonlumo de bovejo nuda

Signis la venon de la Princo Paca

Al nia mondo perfortema, kruda.

La bovo, ĉe la trogo alligita,

Levis la lacan kapon en konsterno,

Por vidi kaŭzon de la romp' subita

En noktsilento de l' bovej-kaverno.

Sed ĝia bruta menso ne komprenis

La konsekvencon de l' infanmalkaŝo,

Ke novaj vivo kaj espero venis

Por ĝi kaj ĉiu sub la skurĝodraŝo.

Tagiĝo de la nova mondepoko!

De la kompato, simpatio, amo!

Seninterese tamen al la trogo

La bovo sin forturnis de l' infano.

Brutmense ankaŭ homoj lin ignoris,

Pro la naskiĝa loko malestimaj:

Nur tri saĝuloj fremdaj lin adoris,

Kaj kelkaj kamparanoj simplanimaj.

John S. Dinwoodie.

URBA PARALIZO

La urbo maltrankvilas en la koro,

Malgraŭ pulsanta viv'! Eĉ la fervoro,

Kun kiu ĝi sinpele turbulentas.

Pri febro pli ol sano dokumentas:

Ĉar famo flustras pri la mallaboro.

Uzinofumo sur ĉiel' serpentas;

Ankoraŭ varoj al merkat' torentas;

Sed flustras senkompate la sufloro.

La urbo maltrankvilas.

La flustro plilaŭtigas ĝis stentoro,

Kaj hurlas la averton strida ĥoro.

Sed streboj reordigi impotentas,

Uzinoj grince cedas kaj silentas.

Koaglas ĉio en malsat-torporo.

La urbo maltrankvilas.

John Francis.

MORGAŬ MATENE

Morgaŭ matene, kun rigora peso

enketos kelkaj duraj profesoroj

pri miaj lastatempaj mislaboroj,

la absoluta manko de sukceso.

Kiel klarigi pri la malprogreso,

al tiuj senkompataj, justaj koroj,

kial inundis min animtorporoj?

Neeble. Mi silentos sub l' opreso.

Kaj ili juĝos min fridsange, prave,

kvazaŭ per fera leĝo de Drakono:

kaj aŭ min amnestios vivosave

aŭ min kondamnos al despera drono;

mi sentas, kiel firme kaj nudglave

la vivo pelas min al Rubikono. . .

Tro drasta estas mia leciono!

William Auld.

HOMAJ PAPILOJ

Ho belaj papilioj, vi multimpresis min,

Naivan lernemulon kun timo en la sin'.

La zamenhofan lingvon aspiris mi en kor',

Kaj eĉ plej mutajn anojn rigardis kun ador'.

Ho lacaj papilioj, dum pli ol plenmonat'

Vi Esperanton studis, ĝis zumis via kap',

Lingvaĉo eksterdube jen vi ekpruvis ĝin,

Flugadis do kinejen vespere en la fin'.

Ho gajaj papilioj, de tem' flugetas vi

Al tem' aliaspeca kun mod' en harmoni',

Dum stulte mi restadas ĉe ĉiamsama tem',

Apenaŭ rimarkante, ke ĝi eksmodas jam.

Ho aĉaj papilioj fidelaj al neni',

Simile al ĝardenaj, ĝenaĵon lasas vi;

Do petas mi ĝentile, ke vi restadu for,

Kaj lasu nin liberaj ĉe inda la labor'.

Tom Fraser.

Tro Rapide

Koresponda Tragedieto

Anonco en "Verda Heroldo." de 11.IV.28: La klubo "Espero" en Bellevue aranĝas propagandan vesperon kaj petas la legantojn ĉiulandajn sendi poŝtkartojn ilustritajn por la ekspozicio. Oni nepre respondos al ĉiuj.

* * *

Londono. 2.V.28.

"Esperanto, la plej universala el ĉiuj universalaĵoj lingvoj, estas mirinda kreaĵo" konstatas la sendanto de ĉi tiu karto. Li ĝentile salutas la geklubanojn kaj deziras grandan sukceson al la propaganda vespero. Al la ĉarma fraŭlino respondonta li sendas apartan saluton.

La karto montras la urbdomon en Londono.

Kun samideanaj salutoj,
C. White.

* * *

Bellevue. 17.V.28.

Estimata samideano,

El la baloto mi plezure gajnis vian ŝatatan karton kaj devas ĝin respondi. Ne! Ne devas; tio ne estas vera, ĉar mi ofte deziris korespondanton en Londono. Estas nun kun granda ĝojo, ke mi sendas ĉi tiun karton kaj mi esperas, ke ĝi estos la unua de longa amika interŝanĝo.

La propaganda vespero estis granda sukceso kaj mi petas, ke vi baldaŭ skribu al mi.

Mi estas 23-jara oficistino ĉe eksportisto.

Kun multaj salutoj,
samideane via
Rose Lebrun.

* * *

Londono. 21.V.28.

Kara samideanino,

Kun granda plezuro mi ricevis vian belegan karton kaj tre volonte mi interŝanĝos poŝtkartojn kaj leterojn kun vi. Ĉu vi ne povos sendi vian foton kune kun via sekvonta letero, por ke mi havu bildon de la plej ĉarma el tuta via klubo?

Laŭ via karto oni ja vidas imponajn konstruaĵojn en Parizo. Ĉu la urbo Bellevue estas proksima al via ĉefubro? Mi tre deziras viziti Parizon, sed kiam, mi tute ne povas diveni; kaj plue mi ne scipovas paroli eĉ unu vorton de la franca lingvo.

Ĉu ne estas strange, ke ankaŭ mi deĵoras ĉe eksporta oficejo? Mia ĉefo estas eminentulo en Londono kaj fraŭlo; mi ankaŭ estas fraŭlo.

Ĉi tiu karto montras unu el niaj artgalerioj.

Tutkorajn salutojn,
via
C. White.

Bellevue. 25.V.28.

Kara amiko,

Mil dankojn pro via lasta karto! Mi nun scias, ke ni havos plezurigan korespondadon kaj mi estas tre feliĉa, ke la baloto donis vin al mi.

Vi petas, ke mi sendu fotografajn. Bedaŭrinde, en la momento mi neniun posedas, sed morgaŭ mi vizitos la fotografiston kaj baldaŭ vi ricevos bildon de via amikino. De vi mem mi tre deziras foton kaj petas, ke vi sendu ĝin per revenonta poŝto. Plue, inter amikoj devas esti nenio kaŝita; do, mi petas, ke vi diru al via amikino kiun aĝon vi havas.

Kia grandega ĝojo! Vi proponas viziti Parizon. Vi tute ne bezonas scipovi eĉ unu francan vorton, ĉar via amikino estos kun vi. Bellevue nun estas parto de Parizo kaj kompreneble mi "forĝos" la oficejon, por ke via amikino traduku ĉion por vi per nia kara interkomprenigilo. Ĉi tiun someron vi certe vizitos Parizon; ĉu ne?

Mi havas nur unu pluan demandon. Kion signifas la "C" antaŭ via nomo?

Kun sinceraj salutoj
de via amikino
Rose.

* * *

Londono. 30.V.28.

Kara amikino,

Vian tre ŝatatan leteron mi ĵus ricevis kaj rapidas ĝin respondi.

Unue pri la foto—la ekzemplero, kiun mi kunsendas, ne estas tre bona, sed mi esperas, ke ĝi plaĉos al vi; poste mi sendos alian, esperable pli bonan. Kaj vi nepre enmetos la vian kun via baldaŭa respondo, ĉu ne?

Kian ĝuindan tempon ni povus pasigi en Parizo! Via kara invito allogas min kaj ĉi tiun someron mi certe vizitos vian ĉefurbon. Sed, akompanante min, ĉu vi agus honeste al via ĉefo? Eble vi povus aranĝi vian libertempon dum mia vizito, sed ne—vi certe preferus la marbordon.

Pardonu, mi petas, la mallongan leteron, sed hodiaŭ mi estas tre okupata kaj la laboro ankoraŭ urĝas.

Plej tutkorajn salutojn,
sincere via,
Charles White.

P.S. Mi ĵus eniris la nunan jarcenton.

Bellevue. 1.VI.28.

Mia kara amiko,

El la vortaro mi trovas, ke Charles estas Karolo kaj Karolo estas Karulo; ĉu ne?

Hodiaŭ mi havas ĝojigan sciigon por vi, Karulo mia. La patro intencas fari komercan vojaĝon al Londono kaj mi turmentos lin ĝis li promesos min konduki. Tio estos mirinda tempo por vi kaj mi, kaj poste vi venos al Parizo; eble vi povos nin akompani.

La patro ankoraŭ ne scias la precizan daton de sia vizito, sed ĝi baldaŭ okazos, kaj mi preskaŭ ne povas dormi pro tio, ke mi antaŭvidas nian renkontigon.

La angla lingvo ne ĝenos min, Karulo, ĉar vi estos kun mi en Londono, kaj mi estos kun vi en Parizo. La patron ni lasos fosi sian propran sulkon.

Kun multaj salutoj
de via
Rose.

* * *

Bellevue. 2.VI.28.

Karulo,

Mi tre bedaŭras, ke mi ne enmetis mian foton, sed nun, jen ĝi estas. Ĝi estas tute nebona kaj kiam vi vidos min en Londono, mi ne portos tian ĉapelon.

Via kara bildo ĉiam akompanas min. Kiajn belajn kaj sincerajn trajtojn ĝi montras! Kaj vi havas 28 jarajn! Du el miaj plej intimaj amikinoj, ankaŭ de mia aĝo, havas edzojn, ambaŭ 28-jarajn.

Karulo, skribu baldaŭ
al via
Rose.

* * *

Bellevue. 4.VI.28.

Karulo mia,

Ni ekveturos post unu semajno kaj alvenos Londonon—ĉe stacio Victoria—la 12an je la 10a horo. Ho! kiel mi povos atendi ĝis tiu tempo!

Karulo, skribu nun, ke vi renkontos nin ĉe la stacidomo. Mi tuj ekkonos vin.

Rapidu, skribu al via amata
Rose.

* * *

Londono, 6.V.28.

Kara amikino,

Kiel malĝojige mi devas respondi viajn karajn leterojn!

Kia soleca tempo estos por vi en Londono kaj por mi en Skotlando!

Mia ĉefo ĵus sciigis min, ke mi devas tuj vojaĝi al tiu malbenita lando kaj li ne aŭskultis eĉ unu vorton, ke io malhelpos min. La koro tremas, kiam mi pensas pri via senĝoja akcepto; mia nura konsolo estas, ke via patro estos kun vi.

Mi ne scias, kiam mi revenos, sed mi sendos mian skotan adreson al via loĝejo en Bellevue.

Kun sinceraj bondeziroj
de via malĝoja amiko,
Charles White.

P.S. Pardonu, mi petas, ke mi ne dankis pro via tre ŝatata kaj ĉarma foto, kiun mi kunprenos por iom ĝojigi la mizeran sorton mian. Mi forlasos Londonon post du tagoj.

* * *

Bellevue. 8.VI.28.

Mia kara Charles,

Mi ĵus intencis skribi al vi, kiam via letero alvenis.

La afero ne estas tiel malĝoja kiel vi diras, ĉar la patro nun prokrastis sian viziton. Sendube ni baldaŭ veturos kaj tiam vi certe estos denove en Londono; ĉu ne?

La edziĝo, kiun oni priskribis en la lasta numero de "Verda Heroldo" estas tre taŭga kaj feliĉa unuiĝo, precipe por la esperantistaro. Sendube vi legis la raporton. La novedzo estas belaspekta kaj belstatura anglo (tute kiel vi!) kaj la bonaŭca edzineto estas juna francino. Kaj ili interkompreniĝis nur per Esperanto, tiu amata lingvo.

Nuntempe mi ne plu skribas, mia kara, ĉar mi rapidas al la poŝto, por ke vi havu ĉi tiun leteron antaŭ ol vi ekveturos.

kun multaj salutoj
karaj kaj amaj,
Rose.

* * *

Bellevue. 27.VI.28.

Kara Charles,

Depost pli ol du semajnoj mi estas sen ia sciigo via. Do, mi sendas ĉi tiun karton esperante, ke vi bone fartas kaj ke mi baldaŭ ricevus longan leteron vian. Eble nuntempe ĝi ja estas survoje al Bellevue.

Ĉiam via
Rose.

* * *

Anonco en "Verda Heroldo" de 1.VIII.28: F-ino Rose Lebrun en Bellevue vigle kaj interese korespondas per L. kaj Pk. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj kun escepto de Anglujo.

Carlo Bourlet:

Mortigo De La "Revuo Internacia"

(Cerpajo el artikolo, kiu antaŭ 40 jaroj aperis en "La Revuo.")

La gripo min doloras.

Mi devas, malsana, resti hejme; kaj mi profitas mian kaptitecon por iom ordigi miajn librojn kaj paperojn. Sub miaj manoj hazarde troviĝas malnovaj kajeroj. Sur la unua estas presite: "REVUO INTERNACIA, monata gazeto, n-ro 1-a, Novembro 1902."

Tuj aperas antaŭ miaj okuloj la fantoma bildo de maldika, pala viro kun longaj blondaj haroj, maldensa flava barbeto kaj fikse rigardantaj bluaj okuloj: Seleznjov!

Tiu asketo, kun sia longa, griza palto, kies kolumo estis ĉiam levita, estas la unua eksterlanda Esperantisto, kun kiu mi parolis en Esperanto. Mi bone memoras la festeneton en la "Cafe Voltaire," kiun ni organizis, en Oktobro 1902, je lia honoro, lian flaman parolon, la fluantecon de lia esprimado, kiu tute mirigis nin.

Seleznjov estas nia parolinstruinto; ĉar li, la unua, konigis al ni, ke Esperanto estas vivanta lingvo; li, la unua, pruvis al ni Parizanoj, ke Esperanto povas esti parolata kun la samaj facileco, eleganteco, rapideco, kiel iu ajn nacia lingvo.

Kio li fariĝis? Ĉu li mortis, kaj nun ripozas en iu nekonata angulo de l' tero? Ĉu li vivas, kaj eble estas vive entombigita en iu Siberia malliberejo?

En Novembro, 1902, kune kun lertaj helpantoj, Th. Ĉejka, J. Krumpholtz, k.a., li fondis "Monumento de Carlo Bourlet."

tiun novan "Revuon." Ĝi estis bele presita, preskaŭ lukse eldonita, kaj plie rimarkinde bone redaktita. Tie la artikoloj ne havis tiun nacian odoron, tiun tradukan aspekton, kiun bedaŭrinde oni tro ofte trovis en aliaj tiamaj gazetoj. La lingvo tie senbride kaj elegante disvolvis sian propran spiriton.

Post kvin numeroj, la eldonantoj devis ĉesigi la aperon de la gazeto, kiu reduktiĝis, kaj fariĝis "Ĉesky Esperantista."

Mankis abonantoj!

Jes! tiu bela, bona gazeto ne trovis la necesajn abonojn por vivi. Mankis legantoj, ĉar la Esperantistoj tiam estis ankoraŭ malmultaj, sed precipe ili mankis, ĉar . . . oni sekrete bojkotis la novan Revuon.

Mi relegas la kvin numerojn por trovi la riproĉitajn tekstojn; kaj malfacilege, streĉante mian memoron, mi rekonas, en tiu nun vere klasika lingvo, la vortojn, kiuj naŭzis la tiamajn konservativulojn.

Tiu Seleznjov, tiu danĝera novigemulo, tiam kuraĝis uzi novajn vortojn, kiel ekzemple "enketo, tendenco, frakcio, k.t.p."! Li eĉ,—kia skandalo!—maltime skribis **Ĉi tie anstataŭ tie ĉi!**

Ĉi tio lasta estis vere netolerebla. La tiama partio de l' Savado senkompatate dronigis lian gazeton.

(Represite kun afabla permeso el la libro

"Monumento de Carlo Bourlet.")

Letero Al La Redakcio

Estimata Redaktoro,

Mi volas kore gratuli al s-ro Dinwoodie pro lia tre trafa artikolo VIVANTA LINGVO. Mi ne arogus al mi aldoni al la nerefuteblaj argumentoj de s-ro Dinwoodie; mi volus nur emfazi kion li tiel prave diras en aliaj vortoj: en Esperanto ekzistas du skoloj. Por unuj Esperanto ankoraŭ estas "provo al Internacia Lingvo," kaj por aliaj ĝi estas "Vivanta Lingvo."

Mi volus tamen mencii parencon temon, kiu estas eĉ pli malofta diskutajo ol la neologismoj.

Temas pri la blinda akcepto de la tiel nomata "oficiala" vortaro. Ni havas tre bonajn kaŭzojn por akcepti la Fundamenton; ne ĉar ni rigardas ĝin kiel perfektan, sed ĉar en

la tempo de la apero de tiu verko ni ja bezonis ian stabililon. Tio tamen ne signifas, ke ni devas por ĉiam kateni nin per la decidoj de la antaŭjaraj L.K., en kiuj ofte troviĝis tute nekompetentaj esperantistoj. Nur du ekzemplojn mi permesas al mi doni: ĉu ni devas akcepti "spontanea" anstataŭ la pli belsona "spontana"? Aŭ la absurda "debeto" anstataŭ "debito"? La Fundamenton kompreneble neniu volas tuŝi, sed la postaj aldonoj estas certe revizendaj.

Oni parolas pri "lojaleco" al la L.K. Tiu lojaleco estas la lojaleco de la Nazi-uloj al Hitler, de la faŝistoj al Mussolini.

Via,

J. Cresswell.

Angers Vokas Vin

En 1947 la grupo en Angers, Francujo, aranĝis dektagan Internacian Renkonton, kiu estis granda sukceso. Tiu sukceso instigis la grupon organizi ankaŭ ĉi-jare internacian semajnon en Angers. Ĝi okazos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1950. La grupo invitas vin al sia alloga urbo, kiu troviĝas en tre bela regiono apud la riveroj Maine kaj Loire. Oni organizos vian restadon laŭ la plej agrablaj kaj malmultekostaj kondiĉoj, kaj aranĝos ekskursojn per ŝipo kaj aŭtobuso al la ĉefaj vidindaĵoj, inkluzive la vinberejojn (kie vi gustumados la famajn vinojn de Anjou) kaj la belegajn malnovajn kastelojn. Por pliaj informoj turnu vin al: Esperantista Grupo, 28 Boulevard Descazeaux, Angers, Francujo.

Internaciaj Feri-Semajnoj kun Somera Universitato Kufstein 19-an ĝis 30-a de julio 1950

La Aŭstria Esperantista Federacio anoncas Internaciajn Feri-Semajnojn, kiuj okazos en Kufstein (Tirolo, Austrio) je la supra dato. Oni aranĝos ekskursojn, koncertojn, dancadon, esp-ajn diservojn, k.t.p. Okazos multaj rondvojaĝoj per aŭtobusoj je prezo de 13-71 aŭstraj ŝilingoj. Somera Universitato okazos en la gimnazio de Kufstein. Oni loĝos en hoteloj kaj privataj domoj. La provizoraj prezoj estas: 1 lito . . . 6-10 ŝil. aŭstr., 1 matenmanĝo . . . 3 ŝil.; 1 tagmanĝo . . . 6 ŝil.; 1 vespermanĝo . . . 6 ŝil.

Aliĝojn oni sendu al: Verkhubo (Trafikoficejo) Kufstein, Tirolo, Austrio. Datlimo de la aliĝoj: 15-a de majo, 1950. Se kelkaj partoprenantoj el la sama E-grupo aŭ el la sama loko sin anoncas, komuna aliĝo sur listo estas petata.

45a SKOTA KONGRESO en Marine Hotelo, Troon 19a-22a de majo, 1950

Ĉefpatrono: Sir Alexander Walker, K.B.E.

Oficiala akcepto - ekskursoj al flughaveno Prestwick kaj al Burns-regiono - amuza-plus-literatura vespero. Aliĝo: 3/6.

Restado en Marine Hotelo po 21ŝ tage (de mateno al mateno aŭ de iu ajn horo ĝis sama horo la postan tagon). Lito kaj matenmanĝo 15/6: tamen estos pli malmultekoste manĝi inkluzive ĉe la hotelo (kie la kuirado estas laŭdire eminenta) ol nur matenmanĝi tie kaj manĝi cetere en aliaj lokoj.

Aliaj hoteloj kaj pensionoj: 18ŝ kaj 15ŝ tage. Junulgastejo en 3-mejla distanco.

Ni petas, ke kiel eble plej multaj kongresantoj elektu loĝi en Marine Hotelo pro la servoj kaj ejoj, kiujn la hotelo al ni disponigas.

Sek-io Karola Rossetti.
5, Willockston Road,
Troon.

Sciigo

Tiu ĉi numero eliras malfrue. Pri tio ni volas klarigi, ke ni forsendis la materialon al la presisto ĝustatempe, sed ĝi iel perdiĝis en la poŝto. Tial ni devis retajpi la tutan enhavon, kaj, ĉar ni ne havis kopion de parto el la perdita materialo, ni devis anstataŭigi tiun parton per aliaj pecoj. Ni esperas, ke la legantoj afable pardonos la prokraston kaj ankaŭ eventualan nevariecon de la enhavo. Ni faros nian eblon por eviti en la estonteco tian situacion, pri kiu cetere kulpas ĉi-foje la poŝta servo.

La redakcio.

Grupraportoj

Edinburgo:

Antaŭnelonge okazis en Edinburgo kvartaga ekspozicio de esperantaĵoj, kiu celis montri al la publiko, kiel disvastiĝis la uzo de Esperanto tra la tuta mondo, kaj ankaŭ la diversajn manierojn laŭ kiuj la lingvo enpenetris la ĉiutagan vivon. Ĉiuj fakoj de la esperantismo estis prezentitaj. Apartan intereson vekis la sekcio "Braille," por kiu afable pruntedonis materialon s-ro Merrick. Post la ekspozicio aliĝis al la Societo minimume 40 novaj anoj, kaj oni starigis du (unuagradajn kursojn kaj daŭrigas la jaman kurson por parolekzerco.

Glasgovo:

Kiel kutime la Glasgova Societo kunvenas lunde vespere en Highlander's Institute. Ĉi tiun jaron la grupo havas 70 anojn. F-ino Black kaj s-ro Kennedy gvidas kursojn por kometantoj kaj progresintoj. Por la grupkunvenoj oni aranĝis programon, kies diversaj eroj enhavas ion allogan por ĉiuj. J.D.W.

Kirkcaldy:

Nia grupo baraktas kun la samaj malfacilaĵoj, kiuj ĝenas esp-ajn grupojn en ĉiuj mondpartoj, kaj la plej embarasa estas la manko de aktivaj membroj. La klaso (neoficiala), kiu renkontiĝas ĉiun ĵaŭdon vespere en Kirkcaldy Technical School, estis tre malgranda, sed je la fino de la duonperiodo du pluaj anoj alvenis kaj . . . neniuj forvelkis! La zamenhofa vespero estis inde festita, kaj f-ino Cochrane el Dunfermlino faris la honorparolon al la Majstro. S-ino Fraser ankoraŭ instruas kelkajn geknabojn unu fojon en ĉiu semajno, kaj espereble unu el ili salutos la Kongreson ĉe Troon.—T.F.

Glosaro:

dura: malmola; **frida:** malvarma; **hurli** (ntr): bleki kiel sovaĝa hundo aŭ lupoj (P.V.); **impeti** (ntr): forte kaj vive sin ĵeti antaŭen (P.V.); **mergi** (tr.): meti en likvaĵon, enprofundi (P.V.); **rojni:** mordeti; **rui** (tr): meti en malvarman likvaĵon por apartigi la fibrojn de aliaj substancoj (P.V.); **sinki** (ntr): malrapide fali, retenate de resto de ŝancelita ekvilibro aŭ de la denso de la medio; **stentora:** tre forta (pp); **stridi:** akre siblegi.

